



monata revuo fondita en 1903

internacia katolika unuigo esperantista

fondita en 1910

honora prezidanto: pastro A. Beckers

CENTRA OFICEJO

CH-9106 ZÜRCHERSMÜHLE - URNÄSCH
SVISLANDO

PREZIDANTO:

PASTRO D.F. LONGONI
I-20051 LIMBIATE (MI)
ITALUJO

SEKRETARIO - KASISTO

PAUL SCHERER - GRABER
CH-6020 ERLLENSTR. 58
EMMENBRÜCKE (LU)
SVISLANDO

ESTRARANOJ:

A. BERKA - ĈEĤOSLOVAKIO
W. MUDRAK - AŬSTRUJO
p. M. CASANOVES - HISPANUJO
P. L. KIS - JUGOSLAVIO
P. W. FLAMMER - SVISLANDO
K. VAN KLEEF - NEDERLANDO
N.W. VIGAR - ANGLUJO
M. ŜVAĈEK - ĈEĤOSLOVAKIO

OFICIALA REVUO

ESPERO KATOLIKA
(FONDITA EN 1903)

REDAKTORO:

P. FELICE RUARO
37010 COSTERMANO (VR)
ITALUJO

POR LA NOVA JARO

La estraro kaj la redaktoro bondeziras al ĉiuj legantoj feliĉan kaj fruktodonan jaron.

La naciaj delegitoj estas petataj sendi novajn kaj kompletajn listojn de IKUE-abonantoj kaj konatigi (rekte aŭ per nia revuo) al siaj samlandanoj la abonkontizon por Espero Katolika.

Jen la ĝisnunaj informoj:

Svislando: sv. fr. 13,50

Italujo: Lire 2.000

Germanujo: DM 12.

Estas pli bone pagi rekte al la nacia reprezentanto.

Pro la multaj artikoloj kaj leteroj senditaj dum la lastaj semajnoj la redakcio dankas ĉiujn verkintojn, kun la espero ke ankaŭ samideanoj de aliaj nacioj sendos multe da materialo.

La estraranoj estas petataj sendi sciigojn pri sia vivo, pri sia pasinta kaj nuna agado. Tion deziras multaj legantoj. Memkompreneble iliaj informoj estos publikataj.

Pastroj de orientaj landoj, por kiuj estas malfacile sendi abonkontizon, povas celebri unu meson je intenco de la redaktoro, avertante lin per letere, La redaktoro tuj prizorgos le elsendon de E.K.

La redakcio.

34.a KONGRESO DE IKUE COMO (Italujo) 15-21 Julio 1972

La nunjara kongreso de IKUE okazos en la mondfama itala urbo COMO, ĉe la samnoma lako, apud la svisa nacia limo.

Kongresejo estas la tre bela vilao Olmo, kie jam multe da kongresoj, eĉ internaciaj, kaj da kulturaj manifestacioj, preskaŭ sencese, okazas.

Jen la provizora programo:

- | | |
|----------------------------|--|
| Sabaton, la 15.an de Julio | — akcepto de kongresanoj. Interkona vespero. |
| Dimanĉon, 16 | — solenaj inaŭguroj. Malfermo de la kongreso. |
| Lundon, 17 | — matene, ĝenerala kunveno
— posttagmeze, enurba ekskurso |
| Mardon, 18 | — matene, ĝenerala kunveno, kun disputado
— posttagmeze, apartaj kunvenoj
— vespere, arta kaj distra vespero |
| Merkredon, 19 | — matene, apartaj kunvenoj
— posttagmeze, ĝenerala kunsido por resolucioj. |
| Jaŭdon, 20 | — tuttaga ekskurso (per ŝipo sur la lako) |

Laŭ la kongresa regularo, ankaŭ membroj de IKUE povas, ĝustatempe, proponi temojn pritraktindajn en la kongreso.

Nia decido (starigi kongreson en Como) alvenis iomete malfrue. Tamen ne estas nia kulpo: Dum la lastaj monatoj stariĝis kelke da miskomprenoj. Finfine klare rezultis ke:

KELI-kongreso okazos en la Rochette (apud Parizo); en tiu malgranda urbo ne estas sufiĉe da loĝejoj por gastigi kune KELI-kaj IKUE,anojn.

La venonta komuna kongreso IKUE-KELI okazos en Beograd, la venontan jaron 1973, kelke da tagoj antaŭ la UK. de UEA. Ni parolos pri tiu komuna kongreso dum nia nunjara kunveno en Como.

Detalojn, aliĝilojn, k.t.p., ni sendos poste, kun la venontaj kajeroj de EK.

Kristnasko: Tago de la Lumo

« MIAJ OKULOJ VIDIS VIAN SAVON »

En la majstra poemo pri la kreado ni povas legi, kiel Dio en sia majesta suvereneco kreis la ĉielon kaj la teron. « Kaj la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo ». La Greka aŭ Septuaginta teksto nomas la teron « aoratos » (blinda) kaj « akataskeŭstos » (nepretigita). La vorto « aoratos » povas signifi **ne povanta vidi kaj ne povanta esti vidata**. Tial ĉie estis mallumo, ĥaoso, senordo.

Tia estis la tero, oni povas diri, antaŭ la naskiĝo de Kristo. Kaj en la unua tago de la kreado la vivanta kaj viviganta spir(it)o de Dio tuŝas la ĥason. Kvazaŭ post profunda spirado Dio age parolas kaj parole agas: « FARIĜU LUMO », kaj fariĝis lumo. Ĉe Dio vorto kaj faro estas unu, kiel la hebrea lingvo havas nur unu esprimon por ambaŭ (dabar). Kaj Dio vidis la lumon, ke ĝi estas bona. Tio estas la mesaĝo de Kristnasko: ke LA LUMO estas bona! Ke Kristo fariĝis la lumo de la mondo. Ke en Li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj. « FARIĜU LUMO » estas la unua vorto — faro de Dio, kaj tiu lumo brilis en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis. Li estas la vera lumo, kiu lumas al ĉiu homo, venanta en la mondon (Joh. 1). Li venis por lumi sur tiujn, kiuj sidas en mallumo kaj

en la ombro de morto, por gvidi niajn paŝojn en la vojon de paco (Luk. 1, 79).

Kristo estas la vivanta pruvo, ke Dio amas la homojn, la tutan mondon. Lia misio estas: alporti lumon al la blinduloj kaj heroldi bonan sciigon al la malriĉuloj. Tiu blindulo kaj tiu malriĉulo estas... mi mem, kiel mi povas legi en la rakonto pri Bartimeo (Mark. 10, 46,52).

Kiam Jesuo foriris el Jeriĥo, kune kun siaj disĉiploj kaj granda homamaso, **blinda** (ĉu mi vidas? **almozulo** (ĉu mi kulpas?) sidis **flanke de la vojo**. La Evangelio diras al mi, ke Kristo estas la Vojo, kaj ke mi, blinda de fido kaj malriĉa de amo, **sidas flanke**, dum la disĉiploj kaj granda amaso de homoj **iras**, kaj kiel ili esperas, **iras sur la vojo**. Sed feliĉe mi, same kiel Bartimeo, havas orelojn por aŭdi mesaĝon de espero! Sed ĉu ankaŭ mi, aŭdante ke la Lumo de la Mondo ĉeestas, ekkrias: « Jesuo (t.e. Javeo savas), Filo de David, kompatu min »? Ĉar tiel preĝante mi rekonas, ke Jesuo estas la Mesio, pri kiu Jesaja antaŭdiris, ke kiam li venos, « tiam malkovriĝos la okuloj de la blinduloj » (35, 5): « La Spirito de la Sijoro, la Eternulo, estas sur mi, ĉar la Eternulo min sanktoleis, por prediki bonan sciigon al mizeruloj » (61, 1).

Ĉu la bona Bartimeo konis ĉi tiujn vortojn? Ilin certe parkeris la disĉiploj, sed kiel ili agas, opiniante sin sur la vojo? Ili admonas lin, ke li silentu! Ili malhelpas al blinda kunfrato iri kaj preĝi al Kristo. La lumo ne atingu tiun mizeran homon flanke de la vojo! Sed ĉar Bartimeo nepre volas kapti ĉi tiun unikan okazon, li ne perdas la kuraĝon kaj des pli forte krias: « Ho Filo di David, kompatu min ». Kaj bone atentu, kion faras Jesuo, agante tute laŭ sia nomo « Javeo savas ». Li diras: « Alvoku lin! » La tuta zorgo de Jesuo nun iras sole nur al li. Kaj Bartimeo estas tiom konvinkita, ke li ne plu bezonos almozpeti **flanke de la vojo**, ke li forĵetas sian ĉifronan biindulan veston (simbolo de la malnova vivo), ĝoje eksaltas kaj iras al Jesuo. Nun, post la alvokiĝo, li ne plu sidas, sed jam iras! Sed kio estas la peto de la blindulo? Ĉu li deziras monon aŭ panon? Ĉu li deziras monon aŭ panon? Ĉu li deziras komfortan vivon? Ĉu li deziras la lumon nur en la okuloj? Nu, lia peto estas: « Rabeno mia, ke mi rictvu vidpovon » (aŭ laŭvorte: ke mi **suprenvidu!**). Kaj la vorto — faro de Jesuo jam sufiĉas: « IRU! Via fido savin vin ». Kaj Bartimeo tuj povis vidi (supren) li vidis en duobla senco, ĉar li sekvis

Lin sur la vojo. Jesuo diris al li: « FA-RIGU LUMO », kaj fariĝis lumo. Kaj la homo, kiu antaŭe sidis en mallumo flanke de la vojo, nun iras en lumo sur la vojo. Alivorte por Bartimeo alvenis la tago de Kristnasko! Jesuo kreis lin nova homo. Kaj same kiel Simeon li povis diri, ke « miaj okuloj vidis Vian savon » (Luk. 2.30).

Okaze de Kristnasko mi volas pripensi — kune kun Bartimeo — ĉu mi jam estas sur la vojo de la lumo. Ĉu mi ne sidas (apatie antaŭ la televida ekrano, rigardante la mizeron en la mondo) flanke de la vojo. Aŭ ĉu mi malhelpas per mia « silentu! » milionojn de nenecese blindaj kunfratoj veni al la lumo? Ĉu mi ne estas blinda de fido kaj malriĉa de amo? Ĉu mi havas la saman esperon kiel Bartimeo? Kaj ĉu mi estas preta esperigi aliajn? Denove mi dezirus — kune kun multe da amikoj en la tuta mondo — helpi al Afrikaj blinduloj, havigante instrumentaron al okuiistoj. Se la kristanoj estas vere « la lumo de la mondo », ĉu tiu lumo povas resti kaŝita? Ke Dio vidu nian lumon, ke ĝi estas bona! Ke ankaŭ niaj okuloj vidu la savon, ĉar tiam la kristnaska festo estos por ni ĉiuj benita kaj gracoriĉa.

Jacques Tuinder

POST LA ROMA SINODO DE EPISCOPOJ 1971

Kiel ĉiu homa institucio ankaŭ la Episkopa Sinodo en Romo ne povas kontentigi ĉies atendoin.

La eklezia presagentejo KIPO disvastigis intervjuon de la ĝenerala superulo de la jesuita ordeno, *Pedro Arrupe*, kiun en Romo oni kutimas nomi « la nigra papo ». Li vidigas pozitivajn kaj negativajn aspektojn de la sinodo.

Patro Arrupe opinias: La sinteno de granda parto de la eklezia hierarkio estas defensiva. La sinodo estis « granda kaj tre fruktodona sperto pro sia klimato de libereco kaj pro sia emo al universaleco ». Tamen « *ni staras antaŭ la ĉiam sama demando: La doktrino estas belega, sed kiel aspektas ĝia praktika aplikado? Kredindecon oni havas aŭ akiras per*

faktoj. La junularo tediĝas pri dokumentoj kaj deklaroj. Hodiaŭ oni postulas faktojn ».

Al la demando, ĉu kelkaj hierarkuloj montras antaŭ koncilan mentalecon, patro Arrupe respondis: « Oni marŝas lace. Oni donas la impreson, ke oni faras koncedojn kun multaj penoj kaj doloroj. Estas defensiva sinteno, kiu klopodas teni distancon ».

Rilate la temon « justeco en la mondo » oni trovis klarajn kaj validajn tezojn. Ĉu oni devas publike nomi maljustajn strukturojn kaj registraĵojn? Patro Arrupe respondis: « Mi opinias, ke tio estas devo de la loka eklezio, kaj ĝi devas fari tion, kiam ekzistas klara kaj okulvidebla maljusteco. Krome la universala hierarkio devas sin montri solidara, se en iu lando regas klare pruvitaj maljustecoj. En tiuj aferoj la eklezio havas eksterordinaran moralan kaj humanan aŭtoritaton ».

W. Flammer

EKUMENAJ INFORMOJ

Himnaro

Alvenis al la redakcio anonco de Pastoro A. Burkhardt, prezidanto de KELI, ke komisiono de tiu kristana movado aperigis la himnaron « Adoru kantante ». Pri ĝi oni parolas pli difuze en la rubriko « La legantoj skribas ».

De kelka tempo IKUE kaj KELI interŝanĝas la oficialajn organojn « *Espèro Katolika* » kaj « *Dia Regno* ».

Anglikanoj kaj koleגיעco.

Anglikana raporto pri la episkopoj ĵus publikigita sentas profunde la influon de la dua Vatikana Koncilo. La koleגיעco estas la startpunkto en la ekzameno de la hodiaŭa episkopa rolo.

La raporto montras la malfacilaĵojn de la nuna situacio. Multaj diocezoj prezentas mezepokajn strukturojn, kiuj ne plu taŭgas por la nuna tempo.

Por efika agado de la episkopoj, precipe en la grandaj urbaj centroj, la starigo de episkopo koleגיעo estas konsiderata la plej taŭga formo nuntempe. Tiuj centroj koncerne la socian vivsistemon kaj la ekonomian strukturon estas konsiderindaj unuopaj komunumoj. Se la Eklezio volus ilin dividi en malgrandajn sendependajn komunumojn, ĝi ŝajnus ignori la socian karakteron de tiuj centroj.

Samtempe ankaŭ la katolikaj anglaj episkopoj ekzamenis similajn problemojn por agado pli efika, respondeca kaj kun misionista spirito. La anglikana raporto certe helpas ilin en iliaj klopodoj.

Anglujo: koncilo de ĉiuj kristanaj estroj. Dum la lastaj jaroj okazis multaj ekumenaj renkontoj, de la vizitoj oficialaj (ekz. tiu de D-ro Ramsey al la Papo) ĝis al la renkontoj je paroĥa nivelo. Intertempe okazis multaj renkontoj de teologoj kaj laborgrupoj. Sed neniam okazis renkontiĝo de ĉiuj religiaj estroj por preĝi kaj diskuti kune.

La unuiĝo de la anglaj eklezioj organizas tian renkonton, kiu memkompreneble postulas diligentan preparadon.

La renkonto okazos en la septembro 1972 en Birmingham. La temo estos: « Kiel malkovri kune la Dian volon ».

La organizantoj anoncas, ke la renkonto daŭros dek tagojn, por ke la partoprenontoj povu sin bone reciproke koni kaj kune lerni.

Ekumena ceremonio en tombejo.

En la germana tombejo de Costermano (Verona) okazas ĉiujare meznovembre signifoplena ceremonio kun la ĉeesto de la germana konsulo.

Antaŭ la parolado de la konsulo kaj la demeto de florkrono parolis ankaŭ la pasintan novembron katolika pastro kaj evangelia pastoro. La belaj vortoj de ambaŭ pastroj montris ankoraŭ unufoje, ke mutegaj estas la punktoj komunaj inter ni kaj la protestantoj.

LA LEGANTOJ SKRIBAS

Adolf Burkhardt, Prezidanto de KELI (= Kristana Esperantista Ligo Internacia) skribis al nia redakcio:

Ne petas vin informi viajn legantojn pri la apero de libro, super kiu komisiono de KELI el kvin nacioj laboris 9 jarojn. La himnaro « Adoru kantante » estas bele presita sur speciala maldika papero, 287 paĝoj en formato 13 × 19 cm. kun fleksebla kovrilo el ruĝa plasto.

La enhavo konsistas el 262 himnoj, ĉu originalaj ĉu tradukitaj el diversaj lingvoj, kaj plej grave, kun kvarvoĉaj muziknotoj uzeblaj por miksita ĥoro aŭ klavara instrumento. Super ĉiu kanto aperas la komencvortoj en la originalaj lingvoj, ĉio cetera estas en Esperanto, kun detalaj indeksoj kaj listoj. La libron redaktis A. Burkhardt, prezidanto de KELI, kaj prof. W. J. Downes, membro de la Akademio de Esperanto, el Germanuoj kaj rep. el Britujo, kunlabore kun A. Ahlrée, Svedujo, H. A. de Hoog, Nederlando kaj Hans Amund Rosbach, Norvegujo. La prezo estas 15,80 DM aŭ egalvaloro, plus afranko. Havebla ĉe la Livro-servo de UEA, via landa libro-servo aŭ rekte ĉe Esperanto-Rondo D-7261 Gechingen, Brunnen-strasse, 4.

Disko kun 4 himnoj el « Adoru kantante » aperis en Svedujo en la eldonejo Förlag Gröna Stjärnan, Fack 7, 686 00 Sunne (Svedujo). Libro-servoj de la Esperantomovado ricevas la kantlibron « Adoru kantante » kun rabato de 20% por unu aŭ du ekzempleroj, de 30% por tri kaj pli da ekzempleroj, plus la efektiva afranko. Por la disko la sveda eldonejo donas rabaton de 20% al revendistoj.

Hans Stahl (Germanujo) skribas:

Sincere mi gratulas vin kun la deziro, ke via pena laboro estu riĉe benata de plej bona sukceso al la profito de ĉiuj adeptoj.

Ne atendu homan danĝon, por ke vi ne siniluziiĝu, sed esperu je Dia kompensado. Bedaŭrinde mi ne povas kontribui, ĉar mi estos baldaŭ okdek-jara; miaj fizikaj fortoj estas jam preŝkaŭ elĉerpitaj. Pro tio mi jam devis antaŭ kelkaj jaroj fordoni la postenon de landa reprezentanto.

Mi korvarme dankas vin pro via preteco al la transpreno de redaktora posteno...

A. Ribot (Francujo):

Mi volas gratuli la redakcion de nia revuo E.K., ĉar mi rimarkis, kiel facile ĝi estas legebla. Efektive dumlonge la presmaniero estis tiel eta, ke mi ne povis legi multajn artikolojn.

Mi intruas la anglan kaj hispanan en privata lernejo. Antaŭ 12 jaroj mi kreis esperantan eldonejon en Marmande kaj eldonis plurajn verkojn de D-ro Zamenhof, lernolibrojn por francoj kaj diskokurson TRA LA MONDO.

Laŭdata estu Jesuo Kristo!

Tarnów, 24.XI.1971

Kara kaj amika Pastro Prezidanto!

Ricevinte Vian afablan leteron kaj E.K. 9 n-ro, kun granda dankemo mi sentiĝis obligita iom priparoli. Mi estas nek sperta esperantisto nek IKUE-ano ĉar mi ne povis pagi membrokoton. Tiel mi devas resti estonte. Sed de longe mi estas leganto vian revuon, kaj bedaŭrinde, observadis batalon en IKUE. Ĉar mi estas sole simpatiano, neniam mi ekparolis. Laste mi ne komprenas tian ĉi revolucion. Se balotoj de 4 februaro estis leĝa, ĉiuj devas obei kaj honori la Prezidanton kaj ankaŭ same Estraron. Mi ankaŭ aliĝas al Viaj geamikoj. Mi persone volas pli, ĉar al poloj pli facile estas alparoli Italon kaj ol germanacianon.

Antaŭa persona batalado inter IKUE-anoj ne meritas konfidon. Kvankam mi volas klare starigi la aferojn, la n-ro 2/3 E.K. maldevis aperiĝi. En unua E-familio oni devas esti pli ĝentila. Tio ĉi malpliigis la abonantojn. Sed mi ne volus, ke Via kara kaj honorinda Redaktoro kaŝiĝu en la naciaj italaj aferoj, sed prizorgu la tutan E-aron, kiu ne ĉiam havas rektan kaj seneraran vojon. Do mi volus, ke estu loko en Via revuo je la artikoloj de alilandanoj, aliepensantoj, eĉ kritikemoj. Alie E.K. fariĝos stagna, senviva kaj per tio ĉi senvalora. Esperantistoj ekparolu en **sia bulteno**, eĉ amare. Estraro povos ĉiam aldoni sian oficialan opinion kaj tio ĉi sufiĉas — laŭ mi. Kiu pagos, ili ankaŭ bezonigos. Ĉu ne? Mi pensas, esperas, ke enhavo de E.K. estos redaktita kaj reprezentinta tutan, tre diversan, eĉ ne tute sanan esperantaron, por ke faru sian sanigan celon kaj estu pli kurioza. Tian novan E-revuon mi preferos kaj esperos.

Kun katolika saluto, ĉiam via

pastro Jozefo ZIELONKA

P.S. Mi tamen petas ree Vin doni al mi manieron pagi abonkoton, ĉar ankaŭ al miaj amikoj mi volas aboni en venonta jaro. Tio ĉi estas povebla, laŭ mi, eĉ per celebrado, aŭ interŝanĝo.

Tarnów, 1.XII.1971 j.

Mia Kara Amiko!

Pliproksimiĝas la Kristnaska Festo kaj la Vigilia Vespero. Kia vento fugos tiam super la homaro, ni hodiaŭ ne povas travidi. Bedaŭrinde, nun maltrankvilas la mondo.

En la Malproksima Oriento naskiĝas la plej terurantaj eventoj. En la Orienta Pakistano niaj gefratoj ĉiutage mortadas en neesprimeblaj suferoj. La rifuĝintoj estas mortpremataj per la malsato kaj malsano. En la plej danĝera situo estas ĉirkaŭ ok milionoj da infanoj elĉerpitaj, kiuj vokas al tuta mondo kompaton. Restintaj ankaŭ proksimiĝas al morto... Dio mia! Simile al nia Oŝwiecim, Majdanek kaj al tuta hitleriana krueleco. Kiam finigos tian sensencan batalon nia altteknika sed senkora generacio?

Prioriente tragika Viĉnamo kaj Kamboĝo; sensaĝa kaj malama afero, kiam la mondo estas sendecida. Krio ankaŭ oni aŭdas el Azio, Afriko, Ameriko, Irlando, kaj kiom estas da muteca malespero ĉie, ankaŭ en nia proksimeco? Kion do ni nun povas reciproke deziri en tia ĉi fama tago?

Super Betleemo kantis la Anĝeloj: «Gloro al Dio en la supera alto, kaj sur la tero paco inter homoj bonvolemaj». Kaj la paco ne alvenis ĉiujn. Al simplaj paŝtitoj la Dia Infaneto donis la gracon. Sed Herodo movita per la malbono sopiregis la sangon. La Betleema morto de infanaro ne estis escepto. Li mortigis siajn edinojn, eĉ la plej sindonajn parencojn kaj idojn. Kvintage antaŭ sia morto li ordonis mortigi la filon, kiun li sola destinis tranherodonton. La larmoj de martirigita lando ne ĉesiĝis. Jesuon li volis ankaŭ senvivigi, kaj malgraŭ tio Kristo vere alportis spiritan pacon al bonvolemuloj.

Ĉu ne estu same nuntempe? Jes! Ni firme kredis, ke la Dio Infaneto benos al ni. Sed ĉu ni estas bonvolemaj, ĉu ne makulis la manojn per la sango aŭ maljustaĵo? Ni poloj per malnova kutimo en la Vigilia Vespere metos sub la manĝotablo la fojn-bukedon, kaj super la tablo aron de grajnoj kiel donaco al Jesuo Kristo. Manĝante la dekdunutraĵan vespermanĝon, eĉ simplan, kiel nia vivo, ni prikantu da Dinaskiĝon. Eltutkora profundo forkuru la voĉo: «Di' naskiĝis, forto falas...». Tiam ni prenu en niaj manoj la blankan paneton (oblaton) kaj disdonu al gefratoj, ankaŭ ne ĉiam simpatiaj, kiel simbolo de amo kaj benvolemo. Pripensu tiam la plej malfeliĉajn gefratojn, solulajn, kaj malesperajn. Dio donu al ili la pacon!

Pro tio bonvolu ekpreni de mi la blankan panon kaj la plej korajn bondezirojn, de mi, kiu anakŭ volas esti feliĉa kaj bonvolema.

ĉiam via frato J. Zielonka

La respondo de nia Prezidanto

Tre kara kunfrato kaj amiko,

tre tuŝis mian koron via letero de la 1.a. t.m.

La paco ne ĉeestas sur la tero. La homoj ne volas ĝin. La bonvolemaj homoj ne estas kapablaj, ĉar ili ne estas registoj de nacioj (de tiuj nacioj, en kiuj eksplodas milito, sennecese). La pacon sur la teron nur Dio povas donaci, tuŝante korojn. Post la vanaj alvokoj de nia Papo al la registaroj de la tuta mondo, nia sola espero estas la Dio de la paco, la Jesuo infano.

Al Li ni devas turni nin, genue, humile, konfesante niajn pekojn kaj niajn malmeritojn. Li ne devas rigardi niajn pekojn sed nur sian Eklezion, sian tre ĉastan edzinon, kaj kompati nin. Dum la sankta nokto mi predikos al miaj gefideluloj pri la paco: la interna paco de la koroj, kiuj sekvas la dian leĝon kaj mi parolos ankaŭ pri via kutima uzado de blanka pano, kiel simbolo de amo kaj benvolemo. Mi manĝos ĝin, en tiu sankta nokto, nome de la tuta IKUE, tutfrate kun vi, kiu sendis al mi tiun oblaton, kaj kun ĉiuj viaj samlandanoj, nome ankaŭ de la tuta nesuferanta mondo kiu partoprenas dolorojn de la suferanta korpo de Kristo en multaj landoj.

Nia bondeziro estas al vi, kaj al la tuta Polujo por ke la nova jaro estu pli feliĉa, pli riĉa je la diaj benoj.

Tutkore

Don Ferdinando Longoni

* * *

Francisko Marsalkowski (Gdansk - Pollando):

Dio, kiu estas Amo, estu ĉiam kun vi kaj Li vidiĝu en via laboro. Hieraŭ post longa atendado mi ricevis la novan numeron de EK... Mi estas preta sendi al vi ĉiumonate homilion aŭ aktualan artikolon, mi povus ankaŭ ĉiumonate prepari paĝon da novaĵoj el socialismaj landoj. Mi havas eblecon tion fari, ĉar mi faras la samon por unu el inter niaj polaj katolikaj revuoj kaj due mi studas teologion, speciale mi okupiĝas pri bibliaj temoj. Dua afero estas, ke mi volas en mia regiono organizi rondon de katolikaj esperantistoj.

Tria afero, ni devas denove batali, por ke Radio Vatikana ekdissendu esperantlingve. De la direktoro de la Vatikana Radio mi ricevis respondon, ke tio eblos se pli multaj skribos.

Mi pretas organizi ĉe IKUE strudronon pri la temo: «Lingvoj kaj religio». Al nia rondo povas aliĝi ankaŭ ne-IKUE-anoj, do ankaŭ KELI-anoj kaj aliaj volontuloj. Interesiĝuloj skribu al:

Francisko Marsalkowski, Gdansk 1, poŝtfako 254, Pollando.

Kaj jen kelkaj pensoj por niaj samideanoj.

Unu el la plej grandaj pekoj de ni,

de ĉi kristanaro, estas eble la peko de preterlaso: preterlaso de io bona, io valora, kion ni povus fari kaj ne faras. Nia devo, devo de ĉiu kristano, estas laŭkapable, laŭinspire agi en la nomo de Jesuo, atesti pri Li, kiu estas Amo. Ekzemple: traduki aŭ resumi la plej interesajn kaj edifajn artikolojn de la kristana diversnacia gazetaro en Esperanton. Ni klopodu, ke pere de la internacia lingvo ĉiu bona penso disvastiĝu tra la mondo...

En nia revuo ni diskutu (ankaŭ ni legantoj). Ekzemple:

Kiel esti kristano? kion signifas kaj kion donas esti kristano? kiel peri la bonan novaĵon, la evangelion, al aliaj niaj kunuloj? kiel peri al ili la dian vorton, eternan vivon? spiritan ĝojon? Ni serĉu respondon al la problemoj de la nuntempa mondo, al aktualaj mondskaj demandoj...

* * *

J. Kovarová (Ĉeĥoslovakujo):

Via urbo (VERONA) estas nomata «fidela» jam de longtempe. Mi preĝas Dion, por ke Li helpu vin esti fidela al via grava laboro kiel redaktoro kaj pastro, al ĉi evangelio kaj al la Eklezio. Mi bondeziras al Vi grandan ĝojon kaj multe da sukcesoj.

RESPONDO AL IUJ KRITIKOJ

Oni scias laŭsperte, ke estas pli facile kritiki ol fari, sed ankaŭ ke la kritiko povas esti tre utila. La kritiko povas fariĝi formo de dialogo klariganta ideojn kaj tiel alportanta pozitivajn rezultojn. Tre grava leĝo: respekto por la homoj kaj por la vero.

Nederlanda samideano skribis: «Danĝera estas tio, ke vi alproprigis la rajton preni el artikoloj la plej interesan parton, ĉar en tiu maniero vi aplikos cenzuron laŭ bontrovo. Multaj protestu kontraŭ tiu starpunkto... Vi scias, ke la I de la vorto IKUE signifas internacia, kaj vi do en la estonteco evitos, ke ĝia organo sin prezentos kiel ital-ĉeĥa afero».

Respondo. Ĝis nun (decembro) nur tiu nederlanda samideano protestis kontraŭ starpunkto. Mia frazo koncernis precipe la leterojn: en nia malgranda revuo ni

LA KONDICO DE LA LABORO

Malfermita letero al Papo Leono XIII.

*de la amerika sociologo Henry George.
(Tradukita de Pavlos Giannelias)*

Aperigo de historia dokumento.

En la mezaj paĝoj de nia revuo ni aperigos ĉiumonate parteton de la letero de Henry George al Papo Leone XIII tradukita de Pavlos Giannelias. Ni dankas tutkore la tradukinton de tiu grava historia dokumento.

Li sendis antaŭ unu monato leteron al la redacio de IKUE dankante la Prezidanton kaj la tutan redakcion pro la decido aperigi la leteron de la amerika sociologo George.

Li aldonis: « Tio certe ebligas la legontojn laŭvole unuigi la tutan tekston kiel broŝuron. Sed mi esperas, ke ankaŭ la IKUE interesiĝos por kolekti la mezajn paĝokvarojn por disponi sufiĉe por eventualaj eldonoj de tiu gravega kaj ĉiam aktuala verketo ».

Sankta Patro.

Mi legis atente vian enciklikan leteron pri la kondiĉoj de la laboro, kiun Vi adresis al la kristana mondo pere de la patriarĥoj, kardinaloj, ĉefepiskopoj de Via konfesio.

Ĉar ĝiaj kondamnoj la plej formalaj estas direktitaj kontraŭ teorio, kiun mi estimas, ke meritas Vian apogon, mi petas Vin permesi al mi meti antaŭ Via Sankta Moŝto la kaŭzojn de mia supozo kaj klarigi kelkajn pripensojn, kiuj bedaŭrinde evitiĝis al Vi. Mia senkulpigo trovas min en la serioza ekstremo de la faktoj, pri kiuj Vi parolas: La mizero, la suferajoj, la revoltemo, kiu maltrankvilas la kristanan mondon; la danĝero vidi la pasion puŝi la nesciadon en blindan batalon kontraŭ la sociajn kondiĉojn, kiuj fariĝas rapide neelteneblaj.

I°

Niaj postuloj estas esprimitaj eksplikite kaj implikite en Via Encikliko. Ni certigas ke:

La mondo estas kreita de Dio.

La homoj, kiuj estas tie enmetitaj por mallonga periodo de tera vivo, estas egale kreaĵoj de Lia boneco, la objektoj de Liaj patraj zorgoj.

Per sia konstruo la homo estas submetata al naturaj bezonoj, kies kontentigo estas necesa ne nur por la daŭrigo de la materia vivo, sed ankaŭ por la evoluo de la intelekta kaj spirita vivo.

Dio ebligis la kontentigon de tiuj bezonoj dependantaj de la penoj de la homo mem, donacante same la povon kaj la ordon labori; tio estas per si mem suprenigo de li pli supren ol la brutoj, ĉar oni povas diri, ke tute respektoplene tio permesas al la homo fariĝi kunlaboristo en la laboro de la kreado.

Dio ne metis la homon en staton de fari brikojn sen pajlo. Samtempe kiam Li donis al li la bezonon kaj la eblecon labori, Li donis al li ankaŭ la unuan pramaterion por lia laboro. Tiu pramaterio estas la TERO — kaj la homo estante materia aĵo kaj besto, kiu povas vivi nur sur la TERO kaj per la TERO, li povas uzi aliajn elementojn, kiel la sunon, la aeron kaj la akvon nur uzante la TERON.

Estante ankaŭ infanoj de la Kreinto kaj havante per Lia antaŭvido egalan rajton por vivi sian vivon kaj kontentigi siajn bezonojn, la homoj havas egalan rajton uzi la teron kaj ĉiu reĝimo, kiu rifuzas tiun egalan rajton, estas morale kondemnebla.

Pri la raito de proprigo ni supozas, ke:

Estante kreitaj kiaj individuaj kapablecoj kaj bezonoj, la homoj havas la rajton uzi siajn proprajn kapablecojn kaj ĝui tion, kion ili produktas — rezerve de la moralaj devoj, kiuj devenas de la rilatoj, kiaj la familiaj ligitajoj.

Ekzistas do antaŭ ĉiu homa leĝo, sed fundamentite sur Dia leĝo iu rajto pri individua proprigo de la objektoj kreitaj per la laboro. Tio estas rajto, kiun la propriĝisto povas transdoni al alioj, sed de kio nenio povas lin rabi kontraŭ lia konsento krom kulpiĝante de ŝtelado.

Tiu rajto de proprigo ripozas sur la rajto, kiun havas ĉiu pri sia persono, kaj estas tial la sola rajto pri kompleta kaj absoluta proprigo. Tiu rajto etendiĝas nur sur la aĵojn produktatajn per laboro, sed ne produktojn kreitajn de Dio.

Ekzemple: se iu homo prenas fiŝon el la maro, li akiras proprigan rajton pri la fiŝo, ekskluzivan rajton, kiun li povas transdoni al alioj per vendado aŭ per donaco. Sed li ne povas akiri proprigan rajton pri la maro; li ne povas nek vendi, nek donaci, nek malhelpi aliojn uzi la maron.

Aŭ se li kontruas ventomuelejon, li atingas rajton pri proprigo de la aĵoj, kiujn la uzo de la vento kapabligis lin produkti. Sed li ne povas postuli rajton de proprigo pri la vento mem, tiel ke li povus vendi ĝin aŭ malpermesi aliojn uzi ĝin.

Aŭ se li vartas grajnon, li akiras proprigan rajton ekskluzive pri la grajno, kiun produktas lia laboro. Sed li ne povas akiri la saman proprigan rajton pri la suno, kiu ĝin maturigis, aŭ pri la tero, kiu ĝin alportis; ĉar tiuj estas donacoj eternaj de Dio al ĉiuj generacioj de la homoj, dona-

coj, kiujn ĉiuj povas uzi, sed pri kiuj neniu havas la rajton rezervi al si mem la eksklusivan uzon.

Konsenti al aĵoj kreitaj de Dio la saman eblecon pri individua proprigo, kiel al la aĵoj produktataj per laboro, estas falsigi kaj ruinigi la veran proprigan rajton. Ĉar la homo, kiu estas devigata forpreni de la produkto de sia laboro por pagi al alion la permeson uzi la maron aŭ la aeron, aŭ la teron, estas neavigata de sia leĝa proprigo kaj estas ofero de ŝtelado, ĉar ni komprenas ĉiujn tiujn aĵojn per lavorto « tero ».

Pri la uzo de la tero ni supozas ke:

Se la propriga rajto, kiu juste etendiĝas sur la objektojn produktitajn per la laboro, ne povas esti etendata sur la teron, tio povas esti submetata al iu poseda rajto. Kiel diras Via sankta moŝto, Dio ne konsentis la teron bloke al la homaro, laŭ la senco, ke ĉiuj povas uzi ĝin sen diferencigo kaj laŭ sia memvolo; oni povas fiksi per homaj leĝoj iajn regulojn por la plej bona uzado de la tero. Sed tiuj leĝoj devas esti konformaj al la morala leĝo kaj devas certigi al ĉiuj la egalan partoprenon al la donacoj konsentitaj per la Dia boneco.

La principo estas tia, kian konsentas familia patro, kiam volas distribui siajn bienojn egale inter siajn infanojn. Ekzistas bienoj, kiujn oni ne povas disigi nek uzi komune; tiaj bienoj povas esti konsentataj al iu aŭ al alio, sed nur kondiĉe, ke per iaj kompensoj la principo de egaleco estas subtenata.

En sociale primitiva ŝtato, kiam oni vivas de ĉaso, de fiŝkaptado kaj rikolto de sovaĝaj fruktoj, oni ne bezonas personan posedon de la tero. Sed kiam la homoj komencas varti la teron kaj realigi la laborojn de daŭra valoro, tia posedo fariĝas necesa por certigi al la laboristo la proprigon de tio, kion produktis lia laboro. Kiu do volus semi, se li ne estus certigata ke rajto pri eksklusiva proprigo permesos al li rikolti? Kiu alligus al la tero produktojn de multekosta laboro, se rajto de eksklusiva posedo de la tero ne certigus lin povi ĝui de tio?

Sed tiu rajto pri individua propriigo de la bienoj kreitaj de Dio estas radikale malsama de la propriga rajto pri aĵoj produktataj per laboro. Tiu unue citata rajto estas limigita, dum la lasta estas senlima, krom ekstremaj kazoj, kiam la neceso limigas ĉiujn rajton. La celo de la unua estas nur certigi la alian eksklusivan pri la fruktoj de la laboro: li ne devas neniigi ĝin. Ĉiu-ajn havas rajton pri eksklusiva proprigo de la tero, nur ĝis kiam li ne malhelpas la rajtojn de sia najbaro; li ne havas pli ol tio.

Se Kaino kaj Abelio ekzemple estus la solaj homoj sur la tero, ili povus konsentiĝi dividi la teron inter si; sekve de ilia kontrakto ĉiu el ili povus kontraŭdiri al la alio sian eksklusivan rajton pri uzo de sia parto.

Sed nek la unu nek la alia povus kontraŭdiri la saman rajton al tria homo venanta en la mondo. Fakte tial, kial neniu homo venas en la mondon sen la permeso de Dio, lia ĉeesto mem certigas lian rajton egalan al tiu de la alioj pri ĉiuj donacoj de Dio. Se Kaino kaj Abeló rifuzus al li la rajton uzi la teron, kiun ili estis divintaj inter si, ili estus kulpaj de mortigo. Kaj se li konsentus tiun rajton nur devigante lin lasi parton de la fruktoj de lia laboro, ili estus kulpaj de ŝtelo.

La leĝoj de Dio ne ŝanĝiĝas. Ilia realigo povas malsamiĝi laŭ la ŝanĝiĝo de la situacioj, sed la samaj principoj restas veraj, ĉu la nombro de la homoj estas malgranda kaj la maniero de produkto estas primitiva, ĉu la loĝantaro estas densa kaj la industrio estas kompleksa. En niaj urboj kaj en niaj ŝtatoj, kie loĝas miloj de homoj, daŭras la vero, ke ni estas teraj bestoj, kiuj povas vivi nur sur la tero kaj ke la tero estas donacita al ĉiuj de Dio, tiel ke se oni senhavigas homon de tio, ekvivalas al mortigi lin, kaj devigi lin pagi por tiu rajto pri uzo de tio, ekvivalas al ŝteli de li. Sed eĉ en iu socia ŝtato, kie la evoluo de la industrio kaj la plimultigo de la senĉesaj plibonigaĵoj faris la bezonon de individua proprigo kvazaŭ universala, ne ekzistas malfacileco kombini tiun individuan posedon kun la egalan rajton de ĉiuj pri proprigo de la tero. Ĉar tial kial iu ero de tero donas al sia posedanto produkton plimulte valoran ol tiu, kiun li elprenus per la sama laboro en alia ero, tiu ero akiras VALORON kiu aperiĝos, kiam oni vendos aŭ luos tion. Tiamaniere la valoro de la tero mem, disigite de la valoro de la plibonigaĵoj, kiujn oni alportis, montras ĉiam la ekzaktan valoron de la bonfaro, pri kiu ĉiuj havas rajton, sed tiu valoro estas precize diferenciginda de la valoro, pri kiu la individua posedanto havas rajton kiel produktanto aŭ sekvulo de la produktanto. De tiam por unuigi la oportunojn de la individua posedo al la justeco de la komuna propriigo, sufiĉas konsenti al la komuna uzo la valoron, kiu estas tiu de la tero sendepende de ĉiu uzo de laboro. Estas kiel en la jam citita ekzemplo de la familia patro, kiu egale antaŭzorgis siajn infanojn per objektoj, kiuj ne estas eblaj al komuna uzo nek al meĥanika egala disigo; rezultas do la vendo aŭ la luo de tiuj objektoj ankaŭ la egala divido de la valoro.

Estas laŭ tiu principo de komuna senco ke ni, kiuj nomas nin « partiuloj de unuopa imposto » volus vidi agi la komunumon.

Ni ne proponas la egalan rajto de ĉiuj pri uzo de la tero metante la teron en komuna uzo, tiel ke ĉiu-ajn povu uzi ĝin ĉie-ajn kaj ĉiam-ajn. Nek ni ŝatas la projekton tute ne realigeblan en nuna socia ŝtato, dividi la teron en egalaj eroj, nek tiun ankoraŭ pli ĥimeran subteni tian dividon iam faritan.

(daŭrigota)

ne povas publikigi tre longajn leterojn aŭ la partojn entenantajn privatajn problemojn. Ni publikigas nur la partojn, kiuj interesas nian revuon, ankaŭ (eventuale) kritikojn al la redakcio. Do ne cenzuro, sed elekto. Kiam venas vendistoj al mia domo, mi ne aĉetas ĉion, sed tion, kio necesas aŭ utilas.

Mia frazo validas ankaŭ por artikoloj pro la samaj kialoj.

Mi diris, ke oni ne fermos la revuon al seriozaj progresemaj tendencoj, sed certe ĝi estos fidela al la katolika kredo kaj al la instruado de la S. Seĝo kaj de la katolika episkoparo. Hodiaŭ mi volas esti pli preciza. Ni publikigos kelkfoje kelkan leteron aŭ artikolon, kiu estos suspekta aŭ enhavas kelkan eraron teologian, sed la redakcio klarigos la kredon de la Eklezio. La redakcio akceptas diskuton, ĉar vidas en ĝi la eblecon riĉigi kaj fari pli konscia nian kredon. Sed oni postulas reciprokan respekton kaj precipe respekton al la grandega aŭtoritato de la Papo (cetere prudenta homo pensas: la Papo estas inteligenta homo, havas la helpon de la Sankta Spirito kaj de multaj episkopoj, verŝajne li vidas pli bone ol mi). La legantoj bone scias, ke pro la malprudentaj atakoj de pasintaj jaroj multaj samideanoj forlasis nian unuiĝon. Tiel mi respondas ankaŭ al la pola pastro, kiu skribis: « Mi ne volus, ke la kara kaj honorinda redaktoro kaŝiĝu en la naciaj italaj aferoj... Do mi volus, ke estu loko en via revuo je la artikoloj de alilandanoj, aliepensantoj, eĉ kritikemaj ». EK afero ital-ĉeĥa? Mi konas nur unu aferon ital-ĉeĥan en Italujo: la bieron Pedavena-Pilsen. La legantoj povas konstati, ke aperas multaj artikoloj el multaj nacioj. Dum la unuaj monatoj ni ricevis malmultajn artikolojn de alilandanoj kaj ne povis inventi.

Dum la lastaj semajnoj alvenis al la redakcio multe da materialo, tiel ke mi devas publikigi iujn artikolojn post du-tri monatoj. Pola samideano skribis: « Ne publikigu artikolojn pri la vivo de la Eklezio en la mondo: tion jam faras la itala revuo Katolika Sento ».

Respondo. K.S. estas por italoj kaj nur provizore por alilandanoj. Nia revuo estas religia gazeto kaj devas pro tio informi almenaŭ pri la plej gravaj faktoj kaj problemoj de la katolika Eklezio.

Nederlanda KELI-ano skribis: « Mi legis en viaj lastaj numeroj pri ekumenismo, sed trafis min ke sub la titolo « Ekumenaj informoj » mi nur legas R.K. ekleziajn sciigojn ».

Respondo. En la septembra numero aperis la titolo « Ekumenaj informoj » anstataŭ la pli ĝusta titolo « Eklezio en la mondo ». Sed oni povas konstati, ke ni raportis multe pri ekumenismo en pluraj numeroj. Ni aperigos artikolojn pri KELI, kun kiu ni intencas havi tre bonajn rilatojn.

Iuj legantoj plendas, ke EK alvenas tro malfrue kaj havas ankoraŭ erarojn.

Respondo. Tio estas vera. Pro toike por la presistoj nia internacia lingvo estas tute fremda, la presado postulas multan tempon kaj la eraroj estas pli facilaj, ankaŭ post la korekto. Ni sendos pli frue la materialon kaj insistos pri ĝustatempa aperigo de nia revuo kaj faros duan korekton de la presprovaĵoj.

Ni petas ĉiujn skribantojn pri tio: ke la artikoloj estu tre klare skribitaj. Kelkfoje mi mem malfacilege legas.

Sprita mastro de budo. Iu sprita mastro de budo elpensis tiun ĉi ruzan ŝercon. Sur la pordo de sia budo li skribis « eniro senpaga ». Granda amaso da publiko plenigis baldaŭ la budon.

Sed kiam la gastoj volis eliri, ili renkontis du grandajn gardistojn kaj sur la pordo la surskribon: « eliro kostas tri frankojn. » La sukceso estis brilanta. Preskaŭ ĉiuj pagis, laŭte ridante pro tiu ideo.

(Zamenhof)

EL LA LANDAJ ASOCIOJ

Resuma raporto pri la Jarkunveno de « Nederlanda Katoliko » okazinta en Utrecht, la 17an de Oktobro 1971.

Post malfermo kaj la enkontduka parolado de la prezidanto, la sekretario sciigis ke 14 personoj informis nin ke ili ne povos eesti la kunvenon. La kaskontrolintoj estis ekzamintaj la financojn aferojn kaj ili konstatis ke ĉio estis en bona ordo. La kunveno elektis S-rojn A. Leideritz el Amsterdam kaj S. P. Smits el Zoetermeer kiel kontrolontojn por la nova asocia jaro. S-ro G. Muller anstataŭos ilin senecese. La protokolo de la antaŭa jarkunveno estis laŭtlegata kaj trovis la aprobon de la kunveno.

Kiel kunvenlokoj por la proksima jarkunveno menciigis Boskoop kaj Heemstede. Oni lasis al la estraro la decidon. La propono de la kasistino pri la plialtigo de la kontribuo ĝis f. 15.00 kun la kondiĉo ke f. 2.50 el tio estu por subteno de la Internacia Katolika Informejo, I.K.I. ne estis aprobita de la kunveno en tiu formo. Tiam **devigan** pagon al I.K.I. oni konsideris neĝusta. Post iom da diskutado oni akceptis plialtigon de la kontribuo ĝis f. 12.50 jare. Aldone oni **povas, sed ne devas**, sendi iom pli. Tiu aldono tial estos transmetata al I.K.I. Pastro Wannemakers nun rakontis ke I.K.I. havis gravajn financojn zorgojn sed pro envenintaj donacoj nun denove povas spiri iomete, tiel ke la planita maja numero de « Vojo, Vero, Vivo » povis aperi en oktobro.

S-ro van Liempt nun sciigis ke ankaŭ la « Fonduso Esperanto ĉe la Instruado » havas grandajn financajn problemojn. Du aliaj nederlandaj asocioj (L.E.E.N. kaj F.L.E.) jam libervole plialtigis la jaran pagon de po 5 cendojn por ĉiu membro al f. 0.60. S-ro van Liempt demandis ĉu ankaŭ N.K. volas fari tion. La kasistino promesis esplori la eblojn. Je la instigo fari propagandon en lokajn ĵurnalojn, k.t.p. por la venonta kurso de TELEAC (Televida Akademio), kiu komenciĝos en januaro 1972, la estraro avertis ke ni ne « trakrozu » la agadojn de Teleac mem. Organizita propagando ne estas dezirinda, sed ompreneble individua atentigo pri tiu kurso estas bona.

Pastro Wannemakers rimarkigis ke ekzistas grava manko je facile haveblaj informoj pri la Esperanto movado ĝenerale, pri la atingitaĵoj, la ebloj, k.t.p. en konvena, ne tro ampleksa libro. Do iu « Vademecum » pri Esperanto. Eble F.E.N. (*) povus pristudi tiun aferon.

Post la paŭzo sekvis la laŭtradicia monkolekto por I.K.I. La bela rezulto estis f. 61.35.

Estrarelekto. La estraranoj, fino T. Durenkamp kaj S-ro W. Liempt estis eksiĝendaj, sed reelekteblaj. Aklamacie tio okazis.

Nia reprezentanto ĉe F.E.N., S-ro J. Muller estis petinta sian eksiĝon el tiu funkcio. La kunveno elektis S-ron S.P. Smits el Zoetermeer por preni sur sin tiun taskon. Inter la nun priparolitaj asociaj problemoj troviĝis la konstato ke nia membraro preskaŭ ĉiujare malgrandiĝis. Tio estas tre grava afero, sed ni restu optimismaj. Eble la venonta televida kurso helpos.

Kelkaj plendoj pri la enhavo de la N.K. parto en la Komuna Esperanto Gazeto estis envenintaj, precipe pri la fakto ke ĝi ne havas « propran vizaĝon » do nesufiĉo da informoj el propraj medioj. Ni klopodos plibonigi tion, sed grandparte tio dependos de la envenontaj artikoloj. El la ronddemando ni citas: instigon de S-ro G.van Dijk, ke ĉiu membro klopodu varbi minimume 1 novan anon jare, kaj

ke por propagando en lokaj gazetoj. k.t.p. ni ankaŭ eluzu la artikolojn el la trimonataj propagandaj paĝoj de Komuna Esperanto Gazeto.

Interesa ideeto de S-ro v.d. Werf. Ni ĉiuj konas la kutimon diferencigi la « rijksdaalder » (***) kaj la « gulden » per surgluo de papereto sur la rijksdaalder ». Kial ni ne uzu Esperanta glumarkon por tiu celo? La kasistino tuj forvendis multajn saketojn da glumarkoj.

La tre vigla kunveno estis fermita de la prezidanto je la 17.30 horo. Ĝis revido en oktobro 1972 en Boskoop aŭ Heemstede.

G. Ellerman, sekr.

(*) F.E.N. = Federacio de Nederlandaj Esperanto Asocioj.

(**) Rijksdaalder = monero de 2½ guldenoj. La du moneroj multe similas unu al la alia.

El Germanujo:

Pastro Ludwig Thalmaier informas:

Meze de novembro okazis en la urbo Rosenheim la sudbavara Esperanto-Ligo-tago. La kunvenon ĉeestis la aŭstralia ambasadoro en Germanujo S-ro Ralph Harry. Mi mem lumbildprelegis pri la temo « Esperanto vivas ». Dimanĉe mi celebris en la preĝejo Josefkirche en Esperanto kaj predikis pri la temo « La lingvokapableco estas donaco de Dio al la homo ».

Ĉu la Papo estis en Vsetín (CSSR)?

Tion certigis juna mesknabo, kiu akolitis dum la sankta meso, kiun celebris la prezidanto de IKUE sac. F. Longoni: la 26-an de semptembro en Vsetín.

Protokolo pri la 3 landa Kunveno de la Sekcio de Katolikaj Esperantistoj de C.E.A.

La kunveno okazis en kadro de la Renkontiĝo en Vsetín la 26.9.1971. Ĝia okazigo estis planita kaj aprobita de ĈEA.

La komenco starigita je la 9a horo. Ĉeestis 50 membroj kaj 20 gastoj. La prezidanto de la Sekcio, frato Aleš Berka, malfermis kunvenon, bonvenigante la gastojn kaj membrojn, tralegis programon de la kunsido, proponinte ellasi 2-an punkton. Anaro unuvoce aprobis ĝin.

1. Prezidanto laŭtlegas salutleterojn, sevkas: salutoj de gastoj: por KELI-sekcio salutas frato A. Odehnal, por IKUE ĝia prezidanto Sacerdoto F. Longoni. Poste salutas reprezentanto de Slovakio kaj ĈEA.

2. Raportoj de unuopaj membroj de la sekcia komitato skizis nian laboron dum forpasinta jaro. Donacetoj de membroj kovris la necesajn elspezojn de la Sekcio — korespondadon kaj eldonadon de Informilo. Ankaŭ vojaĝkostoj al la komitatanoj — por tri komitataj kunvenoj — estis pagitaj de la donacetoj.

3. Nova Sekcia-regularo estis sendiskute akceptita. Pro manko da tempo oni ŝarĝis novan komitaton ellabori ekonomian kaj laboran planon por 1972 kaj antaŭmeti ĝin al estraro de ĈEA.

4. Nova komitato estis elektita jene:

prezidanto: fr. Aleš Berka, Vsetín 1423

vic. prez.: fratino Zdena Králová, Praha 1. Petrská 9
sekretario: fr. František Jindra, Česká Trebová, Slovanská 1702.
kasistino: fratino Jitrenka Vyslouzilová, Vsetín.
komitatanoj: fr. Jirí Korínek, Ustí nad Labem.
fr. Stan. Rímsky, Olomouc, Krapkova 28
fr. Miloš Šváček, Penčice 16. d. Prerov
fr-ino Bozena Malcová, Filipovice.
fratino Kveta Durpeková, Valašské Meziříčí
revizia kom. fr. J. Mlejnek, Mokry Lom. d. Č. Budejov.
fratino M. Lorková, Brno, Cihlářská 16

5. Diskuto: vicprezidanto de ĈEA s. Kočvara parolis pri agado de ĈEA. Fr. Kobza, Šváček alparolis junajn membrojn de nia Sekcio kaj klarigis iliajn devojn rilate al ĈEA.

Tiu ĉi vigla landa kunveno tre bone sukcesis kaj pruvis, ke la kunlaboraro kun ĈEA estas por ĉiu nia membro vere utila.

3-a landa kunveno estis finita per kanto je la 11.35 horo.

Protokolis: Frant. Jindra.

ANONCETOJ

Estas senpage havebla broŝuro 43 paĝa pri la Sinjorino de ĉiuj popoloj. Temas pri aperoj kaj mesaĝoj de Maria en Amsterdamo. Skribu al S-ro C. Wijn. St. Joseflaan 27 — Eindhoven — Nederlando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn: Franz Wegen — Leuvenlaan 62 — Eindhoven — Nederlando.

El Germanujo alvenis samtempe du diferencaj anoncoj kaj opinioj pri nia revuo. S-ino Margarete Schmid (Augsburg) skribis: « Mi anoncas mian eksigon el la IKUE-movado. La « evoluiĝo » de ĝi ne plu plaĉas al mi, ĉar montriĝas regreso, anstataŭ progreso. Sub tiu kondiĉo mi ne plu ŝatas esti membro de tiu organizo... » S-ro Barth. Heinrich Kraus el Oberbibrach: « Mi jam eksigis pro la enhavo de EK, sed nun mi ricevis numerojn de la revuo kaj mi ĝojis pro tio ke oni forprenis la gazeton el la manoj de antaŭaj redaktoroj. Ĝiam mi ricevos la venontan numeron, kaj mi legos ke ĝi restas fakte katolika espero, mi denove volos membriĝi kaj aboni ».

Juna pastro devis iam prediki en malliberejo. Kiam li supreniris la ŝtupojn de la podio, li stumblis kaj falis. Ridado de la malliberuloj. Li leviĝis kaj sen timo diris: « Amikoj, mi venis al vi ĝuste por diri al vi, ke homo povas fali kaj leviĝi. Ankaŭ vi falis, sed kun la helpo de Dio kaj per via bona volo vi povos leviĝi ».

NI FUNEBRAS

Vsetín 2.XII.1971

Profesoro, Jan FILIP ne plu estas inter ni...

Dimanĉe 21.XI.1971 mortis subite — pretigante sin celebri sanktan meson en preĝejo de Kratonohy — D-ro Jan Filip en la aĝo de 60 jarojn. Enterigita li estis en urbeto Pribyslav la 25.XI.1971.

D-ro Jan Filip fariĝis esperantisto jam en sia 15.jaro estante studento de gimnazio. En jaro 1929 aperis liaj unuaj libroj: Kantareto, eldonita okaze de XIV-a internacia kongreso de IKUE en Praha, kaj Granda vortaro Esperanta-ĉeĥa-libro kun 410 paĝoj. Ĝi estis reeldonita post dua mondmilito kiel unua parto de Granda vortaro Esperanta-ĉeĥa kaj dua parto de Granda vortaro Ĉeĥa-Eperanta: impona libro kun 654 paĝoj. En jaro 1936 aperis en Brno teatraĵo: Fino de la mondo, simbola socia simfonio en tri aktoj. Muziko de D-ro O. Svoboda, surkovrila bildo de P. Arnošt Hrabal. En eldonejo « Kristana kulturo » (Svisujo) aperis en jaro 1964 lia dua teatraĵo: La turo inter nuboj. D-ro Filip estis ankaŭ bona E.poeto. Dum 40 jarojn oni trovas liajn poemojn en diversaj E-gazetoj. Lia atento rilate la junularon montriĝis en rakontoj porinfanaj sed speciale en E-anguletoj kun kursoj de internacia lingvo kiuj aperadis dum longaj jaroj en pluraj semajnaj gazetoj. Li verkis ankaŭ en ĉeĥa lingvo. Liaj rakontoj kaj noveloj aperadis en diversaj gazetoj. Libre aperis: Forgesita vorto, kolekto de noveloj.

Vivo de D-ro Jan Filip ne estis facila. Lia persistemo tamen fine ĉiam venkis ĉiujn barojn. Lia frato Karlo sindone kunlaboris en pena laboro super ambaŭ vortaroj. Sia fratino Karla, kunigis sian vivon kun la lia akompanante lin kaj zorgante pri li en « perditaj » postenoj de Orient-bohemiaj vilaĝetoj.

Nia rememoro je granda personeco de D-ro Jan Filip ne estus kompleta, se ni ne rememoris lian sacerdotan laboron. Pro la amo al Kristo, li fariĝis Lia sacerdote. Firma kredo kaj konvinko, ke nur pro la sekvo de Kristo instruo li atingos sian destinitan celon: la savo de la animo, lin tute absorbis kaj donis fortojn instigi siajn proksimulojn same fari. En tio li estis nia ekzemplo kaj tia li ankaŭ restos en niaj memoroj.

Aleš Berka

POST D-ro JAN FILIP.....

En trista jar', en kiu pasis for
tiom da miaj bonaj geamikoj,
nun ankaŭ haltis unu nobla kor'
de hom', kun kiu mankis rektaj ligoj,
kaj kiun mi estimis, sed ne konis,
kaj kiu al ni ciuj tiom donis.
Foriris ne nur bona sacerdot',
sed en la lingvo majstro eminenta.
Meritas laŭdon la vortara dot':
post li restinta verko monumenta,
kiu nin tiom helpis dum jardekoj
ĉe la traduklaboroj kaj ĉe legoj.
Unua postmilita ĉi hirund',
la du vortaroj estas nura ono
de lia daŭre riĉa mens-fekund'
kaj malavara dibenita dono.
Verk' postrestanta plue nin edifos
kaj rememor' eterne en ni vivos.

Jiri Korinek, 30.XI.1971.

LA LASTA TENDARA FAJRO

Dediĉita al la geanaro de la ĉi-jara Somera Esperanto-tendaro en Herbortice.

En malluma noktamaro
brulas fajra heliant'.
De l' tendara gefrataro
adiaŭa sonas kant'.

En la kor' la idealo,
en la man' l'amika man',
en okula ros-vualo
flagras la fajrer-fontan'.

Luno, steloj malaperos
dum tagiĝo de l'auror'.
Tamen ĉiam plu fajreros
arda stel' en mia kor'.

Brilu kiel diamanto,
fajro de l' gefrata sent',
kiun ni per Esperanto
portas al homara gent'.

En la peno altencela
eĥas voĉ' de Betlehem'.
Ni fariĝu ĥor' anĝela
por la paco per kompren'.

Tra malluman mondospacon
brulu fajre nia am'.
Ni heroldu Dian pacon
en konkorda akompan'.

D-ro Jan Filip

MORTIS D-ro JAN FILIP

La 21-an de novembro paroĥestro Filip pretigis sin por celebri la sanktan meson, sed korkolapso tuj kondukis lin antaŭ la ĉielan altaron. Nur unu semajnon poste mi sciiĝis pri la tuja morto de mia kara amiko, paroĥestro de la ĉeĥa vilaĝo Kratonohy. Per regula korespondado mi ekkonis lian grandan sacerdotan koron, plenan de amo kaj plenan de zorgoj. Lia lasta kaj plej granda ĉagreno estis, ke komence de decembro de tiu jaro li devos laŭ la ŝtata leĝo rezigni pri ĉiu animzorgado, ĉar li tiam estos 60-jaraĝa. Eble tiu terura penso ankaŭ forprenis la lastajn fortojn de lia koro. Dio donu al li loĝejon en la ĉiela regno.

D-ro Jan Filip naskiĝis en la jaro 1911 en Pribyslav (en Bohemia-Moravia montareto). 1936 li sacerdotiĝis kaj fariĝis profesoro de gimnazio kaj pedagogia instituto. Plej longtempe li funkciis en Kutnà Hora (1938-45) kie li estis rektoro de la plej granda preĝejo de Sankta Barbara.

La mortinto fariĝis esperantisto jam kiel knabo en 1922. En la jaro 1930 li eldonis la vortaron « Granda Vortaro Esperanto-Ĉeĥa ». En 1947 aperis la dua eldono de tiu vortaro (kun pli ol 1200 paĝoj). 1929 aperis lia kantareto de ĉeĥoslovakaj popolkantoj esperantigitaj. Pluraj poemoj verkintaj en Esperanto aperis en nia revuo « Espero Katolika ». En la ĉeĥa lingvo li skribis kelkajn verkojn prozajn kaj poeziajn kaj plurajn teatraĵojn. Lian dramon « La turo inter nuboj » eldonis IKUE en Esperanto en la jaro 1964. Lia fidela kunlaboranto kaj frato Karel Filip ankaŭ estas sacerdote. Tutkore ni kondolencas lin kaj lian fratinton Karlan, kiu fidele prizorgis la dommastrumadon de la mortinto.

W. Flammer

LODZO, DECEMBRO 1971, PREDIKO

Karaj Samideanoj kaj Samkredanoj, karaj en Kristo Gefratoj.

1. Estas io granda en nia hodiaŭa kunveno; ĉiu el ni sentas tion, ĉiu el ni scias, ke nun okazas io iuscence neesprimebla kaj neripetebla.

a/ Ni komencas hodiaŭ kvazaŭ novan periodon en nia katolika kaj poresperantista laboro. Multaj el Vi memoras la diservojn celebritajn en tiu ĉi preĝejo antaŭ kelkaj jaroj. La nuna diservo estas kontinuuigado de ĉio, kio en iamaj kunvenoj estis plej valora. Tio

estas sendube la volo plibonigi la formojn de nia laboro kaj pliprofundigi nian vivon. Ni volas konsciiĝi, ke nia tasko ne estas nur disvastigi la lingvon de la unueco, sed ankaŭ la unuecon mem. Ni volas labori kun ĉiuj geesperantistoj por unueco de la homaro, sed, antaŭ ĉio, por unueco de esperantistoj mem, precipe en Pollando. La nova prezidanto de I.K.U.E. pastro Ferdinando Longoni skizante la programon de nia internacia revuo skribas: « Espero Katolika pritraktos

ĉiam tion, kio kunigas nin, ne tion, kio nin dividas. Cetere Esperanto naskigis por kunigi, ne por dividi — kaj ni estas ankaŭ esperantistoj, sed ni devas memori, ke ĉefe ni estas la disciploj de Jesuo, kiu preĝis la Patron, « por ke ĉiuj estu unu ».

b/ La unueco de ni kiel esperantistoj devas esti apogita en unueco de nia kristaneco. La unueco de la kristanoj havas pli profundan sencon kaj pli grandan ŝancon ol iu ajn. Por ni estas pli facile atingi la unuecon, ĉar estas por ni profiteblaj kaj uzeblaj la surnaturaj rimedoj. Unu el ili estas Sankta Meso. Do bone okazis ke ni komencas nian laboron ekde la partopreno en Sankta Eŭkaristio. Kaj Eŭkaristio estas vere la sakramento de unueco. Ĝi nuligas la diferencojn, elfluantajn el nacieco, hautkoloro, socia deveno kaj sekso. Kristo unuigas ĉiujn en unu grandan familion de fratoj kaj fratinoj.

c/ Sed por atingi vere kristanan unuecon ni devas aktive partopreni la Sakramenton de la unueco. Ni devas fari tion, kion ĝi signifas. Ni devas bone prepari nin al la partopreno en Sankta Meso. Ni devas jam antaŭ la Meso kunigi kun la homoj en iliaj bezonoj por ke ni povu vere komuniigi dum la Meso. Ke la komunio sankta estu vera simbolo de nia unueco. Mi povas diri, ke ni ne estos vere unuigitaj ĝis kiam nur kelkiuj partoprenos Eŭkaristian festenon kaj la resto estos observantoj. Pro tio ni faros ĉion por ebligi al ni reciproke la partoprenon en Sankta Komunio. Laŭ via volo mi povas ankaŭ konfespreni. Mi esperas, ke krom tia esenca preparo, ni faros ĉion, ke niaj diservoj estu kiel eble plej brilaj, ke ĉiu ĉeestanto metu al ili propran briketon — kantante, recitante ĉu laŭte respondante al alvokoj de celebrante sacerdoto, ĉu eĉ komentante kelkajn vortojn de Mesaj tekstoj kaj aplikante ilin al aktuala vivo.

2. Nia diservo estas celebrata kaj ni esperas, ke ankaŭ en estonteco estos

celebrata en la kapelo, kiu havas titolon de Dia Mizerikordo. Tiu estas iu signo por ni. La tempoj, kiuj iras estas la tempoj, kiuj pli kaj pli urĝe vokas por mizerikordo. Ni kiel kristanoj devas respondi al tiu bezono per bonfaro kaj mizerikorda amo. Ke ĉiu, kiu renkontos nin diru, ke li renkontis Kriston, Mizerikordan Samaritanon. Ni estu Samaritanoj, kiuj konsolas, helpas, estas amikaj kaj bondeziraj. La Prezidanto de I.K.U.E. en sia unua parolo diras i.a. pri kunlaboro de IKUE kun UEA kaj KELI kaj ĉiuj movadoj — ankaŭ neesperantistaj — en la kampo de apostola agado kaj karitato. Ni, kiel Sekcio de Katolikaj Esperantistoj en Pollando, volas fari tion en nia lando. La esenco de apostola agado kaj karitato estas mizerikordo. La mizerikordo estas la voko de ĉiuj tempoj, sed precipe de nia tempo, de nuntempo. Disvastigi mizerikordon signifas labori plej efike por unueco. Ĉar niaj vortoj valoras por niaj proksimuloj nur sub kondiĉo, ke sekvas ĝin la ekzemplo de nia vere kristana vivo. Do unu el la grandaj kaj ĉefaj niaj taskoj estas fariĝi la societo de la mizerikordo.

3. Fari tion signifas pretigi la vojon de la Sinjoro, rektigi liajn irejojn. Se ni tion faros laŭ niaj eblecoj kaj povoj, certe plenumos la vortojn de hodiaŭa Evangelio, kaj plenumiĝos ankaŭ nia jplej sinceraj kaj intimaj deziroj, ke ekestu unu paŝtejo kaj unu paŝtisto kaj ni plenumos sukcese ankaŭ la ĉefan taskon de katolika esperantisto. Tiam plenumiĝos aliaj vortoj de Dio, ke « ĉiu valo leviĝos, ĉiu monto kaj monteto malaltiĝos, la malebenaĵo fariĝos ebenaĵo, la malglataj vojoj glatiĝos kaj ĉiu homo vidos la savon de Dio ». Kaj tiuj de Sankta Paŭlo el hodiaŭa letero al Romanoj: « por ke vi unuanime per unu voĉo gloru la Dion kaj Patron de nia Sinjoro Jesuo Kristo ». Amen.

pastro Roman Forycki

landaj reprezentantoj

ANGLUJO

S-RO N. W. VIGAR,
28 FRANKLANDS DRIVE,
ADDLESTONE - SURREY

AŬSTRALIO

S-RO V. J. TIMMINS,
73 ALEXANDRIA PARADE,
HORNABY N. S. W.

AŬSTRUJO

S-RO W. MUDRAK,
BEATRIXGASSE 19/9,
A-1030 WIEN III, P. K. 105.713

BELGUJO

S-RO E. PAESMANS,
L. KOEPORTSTRAAT 64,
ANTWERPEN, TELEF. 321751 P. K. 41 45 89

BRAZILO

B. E. L. PRAÇA DA REPUBLICA 54, 1 E,
RIO DE JANEIRO

ĈEĤOSLOVAKIO

S-RO ALES BERKA,
NA HARAZI 1423, VSETIN

FRANCUJO

S-RO GASTON VÉRON,
PLACE DE LA PETITE BRUYÈRE,
DONFRONT (ORNE)
P.K.: G. VÉRON
CCP ROUEN 1188-63 Z

GERMANUJO

S-RO GERHARD VOGEL,
TONDERNSTRASSE 36, D-5 KÖLN 30
P.K. KÖLN 166355

HISPANUJO

S-RO MIGUEL MARTINEZ,
AV.DA SAN JOSÉ 105,
PRAL. ZARAGOZA

IRLANDO

S-RO P. J. O' REILLY,
« WOODBINE », BLUEBELL,
DUBLIN 12

ITALUJO

S-RO C. C. FERRARI,
VIALE DEI MILLE 37,
I-20129 MILANO TELEF. 267.895;
P.K. 3-7791

JAPANUJO

S-RO PROF. EIITI MINAMI,
NAKANO-5-CHOME, 26-36 NAKANO-KU,
TOKIO

JUGOSLAVIO

P. FELIX STRICKI,
HADZI MELENTIJA 75,
BEOGRAD

KANADO

S-INO PAULINE PROULX,
790-80 E RUE EST,
CHARLESBOURG, QUÉBEC

KOLOMBIO

P. LUIS E. PALACIOS TORAL,
APARTADO AÉREO 12-03,
CARTAGENA

KOREO

S-RO PAUL KISENG KIM,
I. P. O. BOX 2752,
SEOUL

MADAGASKARO

S-RO RAMANANTSOA CLAUDE
DOMINIQUE GÉRARD
CITÉ AMBOHIPO 469
TANANARIVE

NEDERLANDO

S-RO S. P. SMITS;
KLOOSSTRAAT 55,
ZOETERMEER, P.K. 685124

POLUJO

POLA KATOLIKA
UNUIĜO ESPERANTISTA,
ZABRZE, SKR. PT. 68

PORTUGALUJO

S-RO M. M. LOURENÇO GOUVEIO,
CAIXA POSTAL 456,
FUNCHAL-MADEIRA

SVISLANDO


P. W. FLAMMER,
CH. 9106 ZÜRCHERMÜHLE,
URNÄSCH AR

URUGVAJO

D-RO R. ZEBALLOS MORALES,
FRAY MARCOS (FLOR)

USONO

S-RO H. S. CORLETT,
7605 WINOVA LANE,
SEBASTOPOL, CALIFORNIA 95472



Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)

Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando
Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)

Presejo: Soc. Tipo-litografica G. e M. Bigliardi - Via Tana 18 - I - 10023 Chieri (TO)

Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70 - Supplemento al n. 8-9 de « Lungo la via »